Unuiĝintaj Nacioj: Tergloba Pakto por Migrado 2018

(https://refugeesmigrants.un.org/migration-compact)

La Tergloba Pakto por Migrado estas la unua interregistare negocita interkonsento pretigita sub aŭspicio de Unuiĝintaj Nacioj por kovri ĉiujn dimensiojn de internacia migrado laŭ kompleta kaj ĉionenhava maniero.

Hodiaŭ, pli ol 258 milionoj da migrantoj loĝas ekster la lando de sia naskiĝo. Oni antaŭvidas, ke tiu cifero kreskos pro diversaj kialoj, inkluzive de kresko de la nombro de homoj, pligrandiĝanta interligiteco, komerco, kreskanta malegaleco, demografiaj malekvilibroj, kaj klimatŝanĝiĝo. Migrado ebligas vastajn novajn horizontojn kaj avantaĝojn – al la migrantoj, gastigantaj komunumoj kaj originaj komunumoj. Tamen, se ĝi estas malbone reguligata, ĝi povas krei signifajn defiojn. Tiuj defioj inkluzivas superinundadon de sociaj substrukturoj pro neatendata alveno de grandaj nombroj da homoj kaj pro mortoj de migrantoj kiuj submetas sin al danĝeraj vojaĝoj.

En septembro 2016 la Ĝenerala Asembleo decidis, per akcepto de la **Novjorka Deklaracio pri Rifuĝantoj kaj Migrantoj**, ellabori mondan pakton por sekura, laŭorda kaj regula migrado.

La procedo por elformi tiun mondan pakton komenciĝis en aprilo 2017. La paĝoj en la supre indikita retejo detaligas 18 monatojn de konsultado kaj negocado kaj liveras la esencan dokumentadon por ĉiuj tiuj paŝoj.

La 13-an de julio 2018 la membraj ŝtatoj finfaris la tekston por la Tergloba Pakto por Sekura, Laŭorda kaj Regula Migrado (la teksto haveblas en ĉiuj oficialaj lingvoj).

La Interregistara Konferenco por Aprobi la Tergloban Pakton por Sekura, Laŭorda kaj Regula Migrado okazis la 10-an kaj 11-an de decembro 2018 en Marakeŝo, Maroko. La Pakto estis poste akceptita de la Ĝenerala Asembleo kun kvin kontraŭaj voĉoj (Ĉeĥio, Hungario, Israelo, Pollando, Usono) kaj dek du sindetenoj (Alĝerio, Aŭstralio, Aŭstrio, Bulgario, Ĉilio, Italio, Latvio, Libio, Liĥtenŝtejno, Rumanio, Singapuro, Svislando).

Tergloba Pakto

La Tergloba Pakto por Migrado estas la unua tergloba interkonsento de UN pri komuna aliro al internacia migrado en ĉiuj ties dimensioj. La tergloba pakto estas jure nedeviga. Ĝin fundamentas valoroj de ŝtata suvereneco, komuna respondeco, nediskriminacio kaj homaj rajtoj, kaj ĝi rekonas, ke kunlabora aliro estas bezonata por maksimumigi la ĝeneralajn avantaĝojn de migrado. Samtempe ĝi alfrontas la riskojn kaj defiojn por individuoj kaj komunumoj en la landoj de origino, de transiro kaj de fincelo.

La tergloba pakto kunhavas 23 celojn por pli bone mastrumi migradon je loka, nacia, regiona kaj tergloba niveloj. La pakto:

- celas mildigi la malfavorajn kaŭzojn kaj strukturajn faktorojn kiuj malhelpas tiujn homojn kiuj celas konstrui kaj konstantigi daŭripovajn vivrimedojn en siaj originaj landoj;

- havas kiel intencon redukti la riskojn kaj vundeblojn kiujn migrantoj frontas je diversaj stadioj de migrado, per respekto, protekto kaj plenumo de iliaj homaj rajtoj, kaj per livero de ŝirmado kaj helpado al ili;
- klopodas fronti la pravajn zorgojn de ŝtatoj kaj komunumoj, samtempe rekonante, ke socioj travivas demografiajn, ekonomiajn, sociajn kaj vivmediajn ŝanĝojn je diversaj dimensioj, kiuj povus rilati al, kaj rezulti el, migrado;
- strebas krei favorajn kondiĉojn kiuj ebligu al ĉiuj migrantoj riĉigi niajn sociojn per siaj homaj, ekonomiaj kaj sociaj kapabloj, tiel faciligante iliajn kontribuojn al daŭripova evoluigo je loka, nacia, regiona kaj tergloba niveloj.

  La listo de 23 celoj troveblas en paragrafo 16 de la Tergloba Pakto pri Migrado (https://refugeesmigrants.un.org/sites/default/files/180713_agreed_outcome_global_compact_for_migration.pdf)